ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 3

MARTO 2015 Kol.359/31

xxxx

Edukado.net

La redaktoro informas:
Fine de januaro okazis la dua semestro de la Interlingvistikaj Studoj en Poznan´. Kiel ni jam raportis, kuniĝis 26 aliĝintoj el 14 landoj (7 el Brazilo, po 3 el Hispanio kaj Pollando, po 2 el Slovakio kaj Svedio, po 1 el Rusio, Kroatio, Irano, Ĉeĥio, Hungario, Nederlando, Belgio, Francio kaj Granda Britio).
Post la unua semajno en la septembro 2014 la plimulto el ili tre diligente laboris, sendadis hejmtaskojn, solvis testojn helpe de la speciala paĝo de la studoj ĉe edukado.net.

Fine de ĉijara januaro okazis la unuaj ekzamenoj kaj komenciĝis nova riĉenhava studsemajno. La studentoj bezonas helpon, financan subtenon por siaj vojaĝ- kaj vivkostoj.
Bonvolu legi, kiel ni povas helpi ilin : http://edukado.net/novajhoj?id=521
Atendas vian viziton la redaktoro de edukado.net

Kion fari okaze de Esperanto-Tago?
La Esperanto-tago estas ne nur okazo por celebri la naskiĝtagon de la Internacia Lingvo, sed ĝi ankaŭ ebligas informi la eksteran mondon pri la unika fenomeno Esperanto. Kion fari?
Lokaj grupoj organizu kunvenon pri la Tago kaj raportu pri tio al la lokaj radio-televidstacioj, ĵurnaloj ktp. Informu iom pri la Esperanto-fenomeno. Vi eble povos uzi la jenan paĝaron: http://www.esperanto.net/

Naciaj asocioj preparu vin jam nun. Retadresojn de la naciaj ĵurnaloj ktp. oni ja devus kolekti antaŭ la evento. La Esperanto-urbo Herzberg metis afiŝojn de la koncerna lingvo en multajn “fremdajn“ (t.e. negermanaj) restoraciojn. Ekzemple ili metis la grekan afiŝon en grekajn restoraciojn. Pli ol

82 afiŝoj nun uzeblas. Kial ni ne utiligu ilin por informi aliajn sur via fejsbuka paĝo? Jen ili!
http://www.linguisticrights.org/esperanto-tago/esperanttago.html#sepalinio
Ni krome havas emblemon. Bonvolu ankaŭ uzi tion kaj ni petas konigu al Esperanto-parolantoj. Eble per meto sur via FB paĝo?
http://ttt.uea.org/vikio/index.php/Dosiero:Eo-2015-orange.jpg
Ni ja certas, ke vi iniciatos. Brian

"Anĝeloj"

Jam de mia junaĝo mi lernas Esperanton kaj nur nun mi plene spertas ĉion, kion tiu lingvo donis al mi. Mi ne ellernis labori pere de komputilo, tial mia afabla amiko devas iom lernigi min pri ĝia uzado. Sed lia profesia laborokupo en hospitalo ebligas al li nur malofte viziti min, por instrui min en ĝia uzado, tial mi en ĝia uzado ne tro progresas.

Sed bonŝance ĉiuj miaj geamikoj post miaj operacioj helpas min, se mi bezonas helpon. Unu el ili forsendadas miajn sonregistraĵojn de la Informilo kaj Antaŭen al blinda esperantisto en Kanado, la alia prizorgas min per aĉetaĵoj de nutraĵoj, kaj ĉiuj memoris pri mi, kiam mi devis pasigi Kristnaskon en rekapabliga kuracejo, por ellerno de irkapablo. Kelkaj eĉ pertelefone kontaktis min, por min ĝojigi. Multaj homoj en rekapabliga kuracejo, kiam ili eksciis pri mia hobio – Esperanto, demandis min, kiucele mi ĝin uzas, kiom da vortoj mi konas, kaj deziris aŭskulti mian esperantlingvan parolon, ne komprenante min. Mi do devis ĉion al ili klarigi.

Mi volas danki al ĉiuj miaj „anĝeloj“, kiuj helpoprete zorgas pri mi, kompreneble senprofiteme. Neniam mi imagis, ke mi bezonos helpon de aliuloj, nur nun mi kun dankemo spertas la bezonon de helpo de miaj „anĝeloj“. Mi estas dankema ankaŭ, se ili atentigas min pri eraroj kaj kiamaniere ilin eviti. Jes, neniu estas perfekta, ankaŭ mi ne. Tial dankon, geamikoj, se mi povos, mi iam rekompencos vian helpopretecon.

Liba Filipová

Greziljono

Jen ĝiaj informoj pri sia programo:

2015-apr-03/08: Renkontiĝo de *Interkant'* kaj kunkantado kun *La Kompanoj*

2015-apr-17/25: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Zs. Korody, Ch. Chazarein, M. Quenut - vidu rete <http://gresillon.org/printempas>
2015-apr-25/26: PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1) - vidu rete <http://gresillon.org/printempas>
2015-jul-20/25: Reĝaj ekskursoj, UK-antaŭkongreso - vidu rete <http://gresillon.org/s2>
2015-aŭg-01/08: Lingva semajno, Lingvofestivaleto, tuj post UK - vidu rete <http://gresillon.org/s3>
2015-aŭg-08/16: Festa Semajno por infanoj kaj familioj - vidu rete <http://gresillon.org/s4>

Mallonga raportaĵo el Prago-Esperanto-klubo

La jenajn informojn por nia „INFORMILO“ mi skribas ŝate, ĉar ili estas pozitivaj ....
Estas hazarde, ke en la sama klubejo kiel ni, kunsidadas ankaŭ alia korporacio – naskiĝintoj el la urbo Pardubice kaj el ĝia regiono. Ĉar en PARDUBICE troviĝas unu el la plej aktivaj esperantistaj kluboj (ĉu hazarde?) – la ekspardubicanoj ekinteresiĝis pri ties aferoj, ĉar neniam en sia longa vivo ili aŭdis pri esperantistoj en Pardubice.

Pasis jam unu jaro, de kiam ilia estro inĝ. Pavel Kraus vizitis la centron de la E-agado, kaj konstatis, ke „la domo en la strato "Na Okrouhlíku" estas de la kelo ĝis la subtegmento plena de Esperanto". Kaj de esperantistoj – ĉar tie troviĝas ĝuste la redakto-kolektivo kaj „presejo“ de nia Informilo (kiel ni ĉiuj scias).

Do, estis konsentite, ke iam ni renkontiĝos en la komuna spaco, kie ni havos pli profundan kaj pli interesan konversacion..

Tiu taŭga dato alvenis la 15-an de januaro, ĉijare. Bedaŭrinde, neniu de la esperantistoj el Pardubice povis partopreni (pro malsamaj cirkonstancoj),

tial ili taskis al mi anstataŭi ilin. Ĉar la klubo ekzistas jam pli ol 100 jarojn kaj ĉiu laboro estas dokumentita, ili enmanigis al mi abunde da presaĵoj kaj dokumentoj, el kiuj mi povis prelegi. Sciante, ke ankaŭ niaj pragaj esperantistaj ĉeestantoj scias nemulton (aŭ nenion) pri la meritplena agado de EK Pardubice, mi kunvenigis en nia klubejo ambaŭ korporaciojn.

La temo de mia prelego devis esti „historio de la klubo“ – sed por mi ankaŭ la nuno estas „historio“ (iam estos!). Do mi decidis paroli precipe pri la aktualaĵoj, kiujn kreis la anoj de la klubo. Mi elstarigis la grandiozan laboron de s-ano Josef Hron – **la elektronikan vortaron Ĉeĥa-Esperantan kaj Esperanta-Ĉeĥan.** Mi substrekis la kunlaboron de klubanoj, kies rezulto estas **Esperanta ciferigado** da ĉ. 600 (nome: sescent) historie gravaj kaj interesaj lokoj precipe en la urbo Pardubice mem kaj en la tuta regiono apude. Mi lasis al la aŭskultantaro penso-paŭson, por ke ili disvolvu sian imagon, ĉar la vortoj – nu, estas nur vortoj...

„La triumfo“ en mia mano estis broŝureto pri **Francisko Valdomiro Lorenc.** Ankaŭ ĝi enskribiĝos „en la historion de la klubo“ (almenaŭ en la Kronikon), la merito de la aŭtorino, Jarmila Rýznarová, estu tie ĉi anoncita. Sed mi mem fieris, ke mi povas el la libreto rakonti pri vivo de „la plej granda ĉeĥa esperantisto“ – la samregiona naskiĝinto. Ĝuste pro tio mi invitis ankaŭ pragajn esperantistojn, ke ili konatiĝu kun la fonto de nia „interna ideo“, kiu ŝajne elsekiĝas. La parolo kaj la akcepto estis tre emociplena; des pli, ke mi povis donaci „vian produkton“ , kara aŭtorino, al la partoprenantoj. Omaĝe al d-ro S. Schulhof mi deklamis unu lian poemon. Mi disdonis ĉiujn presaĵojn, en kiuj respeguliĝas la centjara laboro de EK Pardubice, kaj instigis la pardubicajn kolegojn inter la amaso de historiaj aferoj trovi siajn antaŭulojn. Poste ni povus havi reciproke interesan babiladon ....

el EK PRAGO Margit Turková

Ne forgesu reaboni Informilon!

Ekspozicio en Hiroŝima



Okaze de ekspozicio en Hiroŝima sendis Viktor Dvořák sian kontribuon:
por la temo : 70 jarojn post la atombombado la pacon protektu ni mem; se ni ne agados, nenio ŝanĝiĝos.

Ĉi-jare ni rememoras du aeratakojn, kiuj okazis antaŭ 70 jaroj: en februaro oni realigis flugatakojn kontraŭ la urbo Dresdeno (Germanio) kaj aŭguste kontraŭ la japana urbo Hiroŝima. En Dresdeno mortis ĉirkaŭ 25 ĝis 30 mil loĝantoj, en Hiroŝima, kies loĝantaro estis per flugbiletoj avertita du tagojn antaŭe, proksimume 66 mil kaj sekve de radiado 140 mil civitanoj pereis dum la postaj jaroj.

Oni vidas, ke „tradiciaj“ bomboj mortigas same kiel atombombo, sed la vivo de postvivantoj en Hiroŝima estis pli dolora. Bonvolu pardoni la aviadistojn kiuj malsuprenĵetis bombojn, same ankaŭ pardonu al la soldatoj, kiuj militon komencis. Sen pardono ne estos interkompreniĝo.

Ni festos epokon de 70-jara paco sciante, ke la tria tutmonda milito ne estiĝis dank´ al nukleaj bomboj. Estroj, kiuj volus uzi ĝin, timas, ke la vivo sur nia Tera patrino pereus. Sed ili ne timas uzi nenukleajn armilojn kaj ataki najbarajn ŝtatojn aŭ regionojn. Ni levu la voĉon ankaŭ kontraŭ tiuj estroj! La limo inter paco kaj milito estas malvasta.

Viktor Dvořák

http://en.wikipedia.org/wiki/Hiroshima
http://www.valka.cz/clanek_10813.html
http://en.wikipedia.org/wiki/Atomic_bombings_of_Hiroshima_and_Nagasaki , http://eo.wikipedia.org/wiki/Aeratakoj_kontra%C5%AD_Dresdeno
http://www.historylearningsite.co.uk/bombing_of_dresden.htm

Gratuloj al ĉiuj polaj Esperantistoj!

Nemateria kultura heredaĵo – Esperanto estas enskribita de post 31.10.2014 en la Liston de Nemateriaj Kulturaj Heredaĵoj de Pola respubliko, kiel la portanto de Esperanta kulturo. D-ro L. L. Zamenhof nask. en j.1859 en Bjalistoko – nordorienta regiono de Polujo (tiam parto de Rusa regno) – kreis en la j. 1887 artefaritan lingvon Esperanto, kiu fariĝis multsignifa portanto de la esperantista kulturo, propagandanto de paca kunvivo inter la nacioj. Ĝia eminenta kontribuo al la egalrajtigo de ĉiuj lingvoj estas agnoskata de UNESCO, estis multfoje proponata por la NOBELPREMIO de PACO. Ĝian kontribuon por disvastigado de pola kaj tutmondaj kulturoj aprezis la Ministerio de kulturo en Pola respubliko. La redakcio de Informilo gratulas la polajn esperantistojn por tiu ĉi elokventa rekono je la registara nivelo! (Fonto: Revuo Esperanto Nro 2/2015.)

Stanislav Štefan

Banaleco de historiaj eventoj

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis Gian Piero Savio el Israelo. Unu ekzemplo – Jerusalemo 1917:

El miaj klasikaj studoj mi heredis pompan vizion de la historiaj eventoj. Ĝis nun mi emas konsideri ilin kiel solenajn, oficialajn, ceremoniajn okazintaĵojn, per kiuj historiistoj prave povas dokumenti la homan historion. Fakte, ekzamenante pli detale la historiajn eventojn, oni povas malkovri, ke ili ofte okazis tre banale, kvankam poste ili ricevis honoran lokon en la historia memoro. Jen unu ekzemplo.

En la “Imperia Muzeo de Milito” en Londono, mi persone vidis en la vitrino dediĉita al la liberigo de Jerusalemo de la turkoj en 1917 fare de la trupoj de la Brita Imperio, iun blankan tukon pendantan fone. Fakte la kapitulaco de Jerusalemo al la trupoj de generalo Edmond Allenby estas konata kiel unu el la plej groteskaj eventoj en la historio de la urbo. Laŭ fidindaj atestoj, la tiama urbestro, Hussein al-Husseini, estis devigita kapitulacii ne malpli ol kvin fojojn, ĉiufoje fronte de pli altrangaj britaj soldatoj. Sed certe la unua kapitulaco estis la plej ridinda.

Kiam, post malfacilaj bataloj, la britoj alproksimiĝis al la urbo, la turka garnizono de Jerusalemo kaŝe forlasis ĝin, sed Allenby, verŝajne pro timo de kuraĝega otomana rezisto, ordonis al siaj trupoj surkampiĝi malproksime de la urbaj muregoj. La morgaŭon du britaj kuiristoj, trankvile promenante alproksimiĝis al pordego de la urbo kaj tiam, subite ĝi malfermiĝis kaj grupo da aŭtoritatuloj, levante improvizitan blankan flagon, kuris al ili por kapitulacii.

Nur post du tagoj, Allenby faris oficialan, solenan eniron en Jerusalemon, ne surĉevale aŭ per veturilo, sed piedirante por montri sian grandan respekton por la sankta loko. La brita gazetaro surnomis lin "la lasta krucmilitisto", kiu post pli ol 600 jaroj ekde la forlaso de la sankta tero fare de la kristanoj, liberigis la "Sanktan Tombon". Multaj gazetoj publikigis fotojn de la evento, sed, laŭ lastatempaj esploroj, la sola vera foto de Allenby estas tiu, kie oni povas vidi lin, ĝuste piedirante, post lia eniro en la urbon tra la pordego de Jafo. Libuše Dvořáková, MB

Trista anonco:

Antaŭ kelkaj tagoj venis informo pri forpaso de estinta membrino AEH kaj nia bona amikino el Brno JARMILA HANDLOVÁ.
Ŝi mortis la 6-an de januaro 2015 en la aĝo de 88 jaroj. (* 19.7.1926)
Honoron al ŝia memoro !

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Kosnar, J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.